## Prokopio de Cezareo

- Enigma historiisto de la epoko de Justiniano (527-565 p.K.)
- Dekstre, mozaiko de Justiniano de Raveno (Italio).



## *Enkonduko*

## Plano de la prelego

- Enkonduko historia
- La regado de Justinano: pozitivaj aspektoj
- La regado de Justiniano: negativaj aspektoj
- Literaturo de la epoko
- La vivo kaj verkoj de Prokopio, inkl. kelkajn detalojn pri 'klasikstila historio'
- La kredindeco de la *Sekreta historio* kaj napoleona paralelo

## La romia imperio, ĉ. 500 p.K.



## Resumo de la historia enkonduko (ĝis la regado de Justiniano)

- La okcidenta (romia) imperio falis en 476 p.K., ĉefe pro barbaraj invadoj kaj ekokupo de teritorioj de la imperio.
- En 476 pensiiĝis la lasta romia imperio, Romulo Aŭgusteto (*Augustulus*); anstataŭis lin barbara reĝo Odovakar.
- En 490 transprenis la kontrolon de Italio la ostrogota reĝo Teodoeriko.

## La reĝoj Teodoriko kaj Odovakar interbatalas (de manuskripto de la12-a jarcento)



## La reĝo Teodoriko kaj lia maŭzoleo en Raveno





## Resumo de la historia enkonduko (ĝis la regado de Justiniano)

- En la oriento, la situacio preskaŭ egale malstabiliĝis dum la 470-aj jaroj: okazis ŝtatrenversoj (ekz. de Bazilisko kontraŭ Zenono); barbaroj (gotoj) minacis la ĉefurbon, Konstantinopolo; doktrinaj disputoj ankaŭ disŝiris la imperion.
- Sed la muroj de Konstantinopolo malebligis barbaran kapton de la imperio, kaj iom post iom imperiestroj reasertis sian kontrolon.

## La imperiestro Zenono (474-491)



## La imperiestrino Ariadno, vidvino de imperiestro Leono la unua



## La situo de Konstantinopolo




## La muroj de Konstantinopolo





## Desupra panoramo de Konstantinopolo (rekreaĵo)



## La koncilio de Kalcedono (451)



## *La regado de Justiniano: pozitivaj aspektoj*

## (1) La jura kampo


- La justiniana kodo, kiu aperis en 529 kaj kunigas ĉiujn leĝojn eldonitajn de imperiestroj inter Hadriano (117-138) kaj Justiniano mem. Ĝi ordigas ilin laŭ temoj kaj la kompilantoj forigis erojn, kiuj ne plu aktualis.
- La 'Digesto' resumas leĝojn, kiuj datiĝas de la romia respubliko ĝis la kvara jarcento p.K. Ĝi eldoniĝis en decembro 533 post tri jaroj da laboro, dum kiuj la anoj de la komisiono, kiu traktis la projekton, trairis 1500 jurajn verkojn kaj tri milionojn da linioj da teksto.
- Laste la novaj leĝoj de Justiniano (*novellae* latine), ĉar la imperiestro neniel rezignis pri leĝofarado post la apero de siaj grandiozaj kolektoj.
- La kvar verkoj kune nuntempe konatas sub la titolo 'Korpuso de civila juro' (*Corpus Iuris Civilis*).

## La verdikto de Gibbon




- 'La vanaj titoloj de la venkoj de Justiniano jam polviĝis; sed la nomo de leĝofaristo enskribiĝas en bela kaj eterne daŭra monumento'

## Justiniano pri siaj ambicioj



- 'La aferojn, kiujn antaŭaj imperiestroj taksis korektendaj, sed kiujn neniuj sukcesis efektivigi, Ni decidis fari nun kun la helpo de ĉiopova Dio' (Antaŭparolo al la kodekso justiniana).


(2) La arkitektura kampo: la
preĝejo 'Sankta Saĝeco' en
Konstantinopolo/Istanbulo


Interne de la preĝejo


Akvujoj de Konstantinopolo;
la Sankta Saĝeco (dekstre)


Qasr ibn Wardan, Sirio (maldekstre);
monaĥejo Sankta Katerino (dekstre)


Sankta Vitalo (maldekstre); Sankta
Apolinaro *in Classe* (dekstre), Raveno


Mozaikoj en la preĝejo de
Sankta Apolinaro *in Classe*

## Teodora kaj Justiniano, mozaikoj de Sankta Vitalo, Raveno







## La pligrandiĝo de la imperio dum la regado de Justiniano





## Belizaro, kies konsilisto estis Prokopio (mozaikero de Raveno; identigo necerta)



## La venkitaj vandaloj





## Gotaj reĝ(in)oj: maldekstre, Totila, dekstre, Amalasunta (filino de Teodoriko)




## Justiniano pri siaj esperoj rekonkeri la okcidentan imperion



- 'Ni posedas grandan esperon, ke Dio ebligos al ni regi la ceteron de tio, regita de la fruaj romianoj ĝis la limoj de ambaŭ maroj, kion ili poste perdis per siaj maldiligentaj kutimoj.' (30a nova leĝo [*novella*], 536 p.K.)

## Medaliono, ĉ. 535, nun konservita en Parizo: la romia fiereco




## *La regado de Justiniano: negativaj aspektoj*

## (1) Maltoleremo
## Ateno: la platona akademio






## Justiniano kaj lia rivalo, la persa reĝo Kosro la unua (531-579 p.K.)





## (2) Sanga regado. La kontrasto inter Italio sub la ostrogotoj kaj la ruinigo de la duoninsulo sub Justiniano. Sube: (romiaj) konsilistoj de Teodoriko, Boecio kaj Kasiodoro [fakte, manuskripto skribita je lia monaĥejo]





## La eŭnuko Narseso, kiun oni senkiale nanigis, pridiskutas la militon en Italio kun Justiniano kaj Teodora




## La oriento: statuo de Justiniano, kiu rigardas orienten; kameo de romia imperiestro Valeriano (253-260), kies pojnon ekkaptas la persa reĝo Ŝapur I (241-272)





## La persa imperio





## Urboj de la romia oriento: falis Antioĥio, Beroeo (= Aleppo), kapitulaciis Apameo






## La urbo Antioĥio







## La hipodromo, kie masakriĝis la fanatikuloj en januaro 532





## Teodora kuraĝigas Justiniano dum la 'Nika' tumulto (januaro 532)



## La pesto kaj ĝia disvastiĝo




Kiel oni ricevas la peston; Aleksandro Jersin, kiu en 1894 unuafoje izolis la bacilon; bubono (inflamo de limfonodo)







Erupcio de Krakatoa (1883): en la sama regiono okazis erupcio en 536





## La sekvoj: dekstre oni vidas la areon kaŝitan de polvo tagojn post la erupcio de 'proto-Krakatoa'




## *Literaturo de la epoko*


- Agatio de Mirino (Agathias, Myrhina)
- Menandro la gardisto (Menander Protector)
- Evagrio (Evagrius)
- Johano de Efezo (Johannes, Ephesus)
- Grafo Marcelino (Marcellinus *comes*)
- Johano Malalaso (Johannes Malalas)
- Pseŭdo-Zakario la oratoro

## Prokopio: vivo

- Naskiĝis ĉirkaŭ 500 p.K.
- Enposteniĝis kiel jura konsilisto de la generalo Belizaro en 527.
- Li sekvis Belizaron dum liaj kampanjoj ĝis la fruaj 540-aj jaroj.
- Liaj *Militoj* eldoniĝis en 551 (sep unuaj libroj); la oka sekvis en 554.


Cezareo (Palestino), rekonstruo de la ĉefsidejo de la guberniestro de la provinco







*La radikoj de klasikstila historio*

La du fondintoj de la ĝenro: Herodoto kaj Tucidido (dekstre)





Tacito (55-120 p.K.), akra kritiko de la imperiestro Tiberio (dekstre, regadis 14-37 p.K.)





La verkoj *Pri la konstruaĵoj* kaj *Sekreta historio*

## La du aliaj verkoj de Prokopio

- *Pri la konstruaĵoj*, kiu probable aperis en 554, sed iuj preferas 559.
- La *Sekreta historio*, kiu neniam eldoniĝis dum la vivo de Prokopio, sed nur reaperis ĉirkaŭ 1000 p.K. Probable Prokopio komponis ĝin ĉirkaŭ 550, sed iuj esploristoj preferas 559; ĉiaokaze oni aludas 32 jarojn de la regado de Justiniano.

## Justiniano kaj Teodora





## Prokopio pri Justiniano (*Sekreta historio* 8.27-30)

- Kiel iu kapablus kapti la trajtojn de Justiniano per vortoj? Li ŝajnis posedi ĉi tiujn trajtojn [diskutitajn supre en la verko] kaj multajn aliajn pli terurajn kaj kontraŭhomajn. La naturo ŝajnis forpreni la trajtaĉaron de la aliaj homoj kaj ĝin enmeti en lian animon. Krom siaj aliaj (trajtoj) li ege facile bonvenigis kalumniojn kaj estis tre akra pri punoj. Neniam li profunde esploris ion antaŭ ol juĝi, sed tuj, aŭdinte la akuzon, li decidis kaj eldonigis la decidon.

## Prokopio pri Justiniano (*Sekreta historio* 8.27-30)


- Sen ajna hezito li skribis leterojn, kiuj ordonis senkiale la kapton de urbetoj, la bruladon de urboj kaj la malliberigon de tutaj gentoj. Sekve, se iu mezurus ĉiujn spertojn romiajn ekde la komenco kaj volus ilin kompari al ĉi tiuj (de hodiaŭ), ŝajnas al mi, ke li trovus pli grandan masakron de homoj okazintan fare de ĉi tiu viro ol okazis en ĉiu alia epoko.

## Prokopio pri Teodora (*Sekreta historio* 9.15-16)



- Siajn amantojn ŝi mokis kaj indulgis, kaj per novaj teknikoj de sekskuniĝoj ŝi koketis kaj ĉiam aligis al si sendisciplinajn homojn, ĉar ŝi ne opiniis, ke la viro, inter tiuj, kiuj apudis, devas klopodi (flirti), sed prefere ŝi komike kaj klaŭne koksosvinge tentis ĉiujn preterpasantojn, aparte la adoleskantojn.

## Prokopio pri Teodora (*Sekreta historio* 9.15-16)



- Neniam ekzistis persono pli sub la influo de ĉiuj plezuroj: ofte ŝi ĉeestis bankedon, al kiu ĉiu alportis ion, kun dek junuloj aŭ pli, ĉiuj je sia pinto korpe kaj forte kaj spertaj pri voluptado, kaj ŝi kuŝis kun ĉiuj sambakedanoj dum la tuta nokto. Kiam ili ĉiuj rezignis pri ĉi tiu agado, ŝi iradis al iliaj servistoj, eble trideko da ili, kaj pariĝis kun ĉiu el ili, sed eĉ tiam ŝi ne satiĝis de ĉi tia voluptado.

## Prokopio pri la danĝeroj de verkado sub Justiniano (*Sek. hist.* 1.1-2)

- Ĉion, kio okazis al la raso de la romianoj en la militoj, ĝis nun mi rakontis laŭ metodo, per kiu eblis kunigi ĉiujn rakontojn de la agoj laŭ iliaj kronologia ordo kaj loko. Ekde nun ne plu konvenas al mi rakonti tiel, ĉar raportiĝos ĉi tie ĉio, kio okazis ĉie en la romia imperio. La kaŭzo estas, ke mi ne povis priskribi (la eventojn) laŭ taŭga maniero, dum ankoraŭ vivis tiuj, kiuj ilin kaŭzis. Ne eblis eviti la amason da spionoj nek, se oni eltroviĝis, la plej kompatindan morton. Mi ne fidis (eĉ) la plej intimajn de miaj parencoj...

## Citaĵo de la angla historiistino Leslie Brubaker pri la *Sek. hist.*; maldesktre, moderna bildo de Teodora



- 'La *Sekreta historio* estas sukcesa fikciaĵo, brila parodio de imperia panegiro. Ĝi diras nenion pri Justiniano kaj Teodora.'
- Panegiro: 'solena verko, destinita al la laudado de la agoj kaj faroj de iu persono' (*NPIV*, 834).

## Prokopio anticipas modernajn dubojn, *Sek. hist.* 1.4.

- Sed nun mi aliras alian defion, danĝeran kaj terure netrakteblan – tiun de la vivoj de Justiniano kaj Teodora. Klakas miaj dentoj kaj, kiam mi intencas rakonti tion, mi tre hezitas, ĉar (mi timas) ke la aferoj, kiujn mi rakontos, ŝajnos al tiuj, kiuj naskiĝos poste, nek fidindaj nek probablaj; aparte kiam granda tempofluo igos la rakonton pli malnova, mi timas, ke mi akiros reputacion de mitologo kaj klasiĝos inter la tragediistoj.


## Dmitri Volkogonov (1921-1997), historiisto kaj partiano



- Harold Ŝukman pri Volkogonov: 'Volkogonov konfesis publike ke, kiel multaj altgradaj sovetaj funkciuloj, li vivis du mensajn vivojn, ĉiam pli altiĝante en sia kariero sed samtempe tunelante pli profunden en la arkivoj, kvazaŭ simbole subfosante la sistemon, kiu lin nutris.'

## *Ĉu kredi la* Sekretan historion?

## La irlanda historiisto J.B. Bury




- 'Ni trovas, ke en granda nombro da kazoj liajn faktojn konfirmas aliaj fontoj, dum en neniu kazo eblas lin kondamni pro aserto, kiu neniel baziĝas sur fakto.'
- Bury, *History of the Later Roman Empire* (Londono, 1923), vol.2, 426-7.

## *Paralelo napoleona*

La limzono, kie kampanjis Belizaro en 541; Sisaŭranon troviĝas iomete oriente de Nisibis




Antonina: laŭ Treadgold, *Art Bulletin* 79.4 (1997), tuj dekstre de Teodora



Belizaro, tuj maldekstre de Justiniano (denove laŭ Treadgold)



La kampanjo de Napoleono en Italio, 1796




Napoleono kaj Jozefino



